


*horzontale*


1 enloĝant' de proksima oriento 4 pensaĵ' 6 malofta 9 ĉieldirekt' 10 dika tranĉaĵ' de viando 11 river' tra Munkeno 13 part' de skeleto 15 rabobesto 17 zorgi por eviti danĝeron 19 altaj ŝuoj 20 instrumento 21 jarsezon' 24 forta inklino al iu aŭ io 25 braka ost' 26 kolor' 27 malgranda 29 kuraĝig' per parolo 31 valormetalo 33 estaĵ' rigardata kiel sanktaĵo de idianoj 35 kontinent' 37 pozitiva elektrod' 38 manier' por esprimi per verkoj la belon. 40 ŝtat' en Hindoĉinio 41 part' de optika instrumento 42 lok' en la centro de cirko. 43 speciala form' de oksigeno 44 karesform' por fratin' de patro aŭ patrino 45 salajr' de soldatoj

*vertikale*

1 aldoni ion aŭ iun 2 ĉiuj membroj de iu asocio aŭ movado 3 rand' de akvo 4 naskito, infano, filo 5 helpverbo (radiko) 6 parto de fervojo 7 rapide graviganta (malsano) 8 miksaĵo de metaloj 12 formulon dum ekvido 14 grajn' por ekesti planton1 6 regiono en la nordo de Germanio kaj Pollando 18 religi' 19 koloro 22 mov' de akvo 23 malgranda parto 27 parto en domo 28 korala insulo 30 granda akv' 31 granda urbo en Alĝerio 32 kunlig' kun oksigeno 34 ĝarden' en paradizo 36 plata fiŝ' 38 ludkarto 39 membr' de popolo en Hindoĉinio

***solvo de la januara numero :*** Mauro La Torre (1946) el Italujo prelegis ĵaŭdo je 10:30h pri kompreno de komputiloj. Hans Eichhorn (1942) el Germanujo prelegis lundo pri perforto en la psikiatrio. Eva Barandovská (1952) el Ĉeĥujo prelegis dimanĉo je 15:00h pri lingvoj kaj planlingvoj Ivan Bujdoso (1944) el Hungarujo prelegis ĵaŭdo je 15:45h pri la eŭropa konstitucio. Geraldo Mattos (1938) 3l Brazilo prelegis di manco je 17:00h pri ideologio en E-poemoj.

Konontaktu nin! Gun.Eb@t-online.de +49 3831 490003



# Stralsundaj frekvencoj

Per Esperanto por popolkompreniĝo

jaro 2007 marto

Jen la de via kordezir',
ĝi estas plenumita.
Triumfas vi, ĉar la sopir'
nun estas superita.

Amiko,
ne petolu tro,
kaj bridu vian langon!
Dezir' solvita baldaŭ, ho,
ricevos idan sangon.

laŭ Wilhelm Busch

❍

La marto kutime estas laŭ la meteorologoj la unua monato de la printempo. Esperu ni ankaŭ pri nova printempo en la movado.

**Nia venonta kunveno:** ĵaŭdo, la 22a de marto, 14:00h, en la kafejo Strahl, Mönchstraße. Gastoj estas dezirata.

Gratulo



Ni, la Esperanto-grupo el Stralsund, gratulas elkore al vi, kara Fred, la senioro de nia grupo, okaze de via 80-a naskiĝtago. Ni deziras ĉion bonan, aparte fortan sanon kaj ni deziras ankaŭ plu vian fidelicon al la Esperanto-grupo en la nordo.

Elkore,

en la nomo de ĉiuj membroj de la E-Grupo en Stralsund,

Monika

❖

## *Interesaj taskoj*

Dank' al la informo de Werner Pfennig ni eksciis pri la aktiveco de la japanaj virinoj en Hiroŝimo. Dum la lasta kunveno de nia Stral-sunda grupo ni decidis kontribui al tio temo. Tuj je la sekva tago mi sidigis min al mia komputilo kaj pripensis kelkajn vortojn. Ne estas facile trovi solvon. Kiel krei por la posteuloj mondon sen milito, se la politikistoj tute ne montras emon rezigni pri minaco kaj perforto. Kaj ĉu la popoloj efike kontraŭstaras al tiu ĉi emoj ? Bedaŭrinde ne! Kontraŭe! Tamen mi trovis kelkajn vortoj kaj sendis ilin al Japanujo. La respondeca sinjorino konfirmis mian kontribuon kaj promesis publiki ĝin kaj informi pri la plua iro de tiu ĉi nobla aktiveco.

Gunter

***OK celoj, ok Hanse-urboj***

En la jaro 2000 subskribis 189 ŝtat- kaj registrarĉefoj dum mileniumkonferenco en Nov-Jorko deklaron por batalo kontraŭ malriĉeco kaj malsano. Laŭ iniciativo de Kofi Annan estis deklarataj ok celoj ĝis 2015:

1. Neniigo de malriĉeco kaj malsato
2. Enkonduko de unuversala baza edukado por infanoj
3. Egalstarigo kaj subteno de la virinoj
4. Malaltigo de la infanmorteco
5. Plibonigo de la sano de patrinoj
6. Batalo kontraŭ HIV, malario kaj aliaj malsanoj
7. Instaligo de efika medio-protekto
8. Kreado de globala partnereco por evuluo

La germana registraro reagis kaj sendis aktiveco-buson tra ok Hanse-urboj (Bremen – Kiel – Lübeck – Wismar – Greifswald – Stralsund – Rostock – Köln). En ĝi oni kolektas voĉojn al la celoj kaj volas uzi tiujn dum G8-kunveno en Heiligendamm. En Stral-sund ĝi staros de la 18a ĝis 21a de aprilo.

La urboj havas la taskon aranĝi kadran programon kun ekspozicioj, prelegoj kaj diskutrondoj. Rimarkinde estas, ke oni ankaŭ pensis al la esperantistoj kaj petis nian grupon je kontribuoj. Ni uzos la eblecon por prezenti nian movadon kaj nian grupon kaj mi pensas, ke ekzistas sufiĉe da materialo. Se vi havas iu ajn rimarkindaĵon, nepre informu nin interrete.